Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
JAARGANG
N° 4 MEI/MAJO 1984

ATENDINDAĴOJ

LA VENONTA ESTRARKINSIDO OKAZOS JE SABATO 2-A DE JUNIO EKDE 10.00 H. KIEL KUTIME EN ESPERANTODOMO, FRANRIJKLEI 140, ANTVERPENO.

## KLUBO 100

ĈU VI MEMORAS ? KLUBO 100 STARIĜIS POR FINANCI LA PREPAR-PROGRAMON POR LA JUBILEA JARO.

ALIĜO EBLAS PER PAGO DE UNUFOJA KOTIZO DE BF. 1.000,- KAJ RAJTIGAS JE PARTOPRENO, TIEL EN LA KUNSIDOJ KIEL ANKAŬ EN LA DECIDOJN KTP.

LA KONTO : 034-0379435-33

VI TAMEN ANKAŬ POVAS PAGI PERE DE FEL (VIDU ESPERANTO PANORAMA) KAJ TIEL PROFITI LA ŜANCON SUBTRAHI VIAN KOTIZON DE VIAJ IMPOŜTOJ.

ĜIS NUN ALIĜIS DEKTRI PERSONOJ.

KIAM VI ?

I N F O R M I L O . Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTOLIGO
Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN
Telefono 03/234 34 00
Jarabono : BF 150,- Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43

---

Prezidanto : Ivo DURWAEL, Paul Gilsonlaan 5
2520 EDEGEM 03/440 30 92

Sekretario : Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14
2510 MORTSEL 03/449 50 06

Financoj : Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A
9440 EREMBODEGEM 053/77 44 97

Paul PEERAERTS, Baron Dhanislaan 13
2000 ANTWERPEN

Informado : Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A
2180 KALMTHOUT 03/666 62 66

Intergrupa agado : Hilde VAN INGELGEM, Arbeidstraat 21
9300 AALST 053/70 50 11

Trees DOOMS, Baron Dhanislaan 13
2000 ANTWERPEN

Junularo : Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8
2510 MORTSEL 03/449 50 24

Kadrokursoj : André STAES, Jan Denucéstraat 1/198
2020 ANTWERPEN

Literaturo/eldonoj Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2
2000 ANTWERPEN

Gazetara servo : Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT
Lusthuizenlaan 1 b. 4, 1500 HALLE 02/360 17 22

Sciencoj : Wim DE SMET, Hertendreef 12
2180 KALMTHOUT 03/666 99 49

Provincaj respondeculoj :

Brabanto : M. Th. HENQUINEZ 016/23 61 90
Lipsestraat 166, 2991 TILDONK

Limburgo : Guido SCHROEYERS 011/53 64 10
Helzoldstraat 113, 3558 HELCHTEREN

Okc. Flandrujo : vakas

---



# P R O T O K O L O

**pri la estrarkunsido de sabato 5-a de ĵaŭo 1984 en Antwerpen**

---

Ĉeestas : Ivo Durwael (ID), Paŭl Peeraerts (PP), Kristin kaj Wim Tytgat (KT kaj WT), Jules Verstraeten (JV) kaj Jan Bovendeerd (JB)

Petis senkulpigon : Edward Symoens.

Prezidas : ID - Protokolas : JB

## T A G O R D O

1.1. Pri la protokolo pri la estrarkunsido de 07 04 1984 :
4.2.6. Bv. legu : "FLEJA intencas eldoni informbroŝuron por la junlaro kaj petas subvencion al FEL <u>por tiu broŝuro</u>".
4.2.9. anst. "... Lasu al FLEJA la gajnon el siaj vendoj.." legu "... la gajnon el ĝiaj propraj vendoj."

Rilate al p. 4.1 ID kompletigas ke ES promesis en la ĝenerala jarkunsido ke li daŭrigos en la informa kampo. ID kontraŭstaras la titolon de "honora prezidanto", ĉar honora signifas, almenaŭ por la ekstera mondo,"ne plu aktiva". Li preferas la titolon "estrarano pri informado".

Por la cetero, la protokolo estas aprobita.

1.2. <u>Plenumitaj taskoj</u> :
JB faris la al li komisiitajn taskojn, nome sendi subvencipeton al Inst. Hodler 68 kaj leteron al Eldonejo SONORILO.

2. <u>JUNULARO</u>

2.1. <u>Libroservo</u>
WT proponas kontrakton rilate al la transpreno/-dono de la FLEJA librostoko. Jen la ĉefaj trajtoj :
- La transdono okazu kontraŭ pago de sumo difinita surbaze de kompleta inventaro.
- FLEJA daŭrigos la libroservon en kongresoj, krom se mankas taŭgaj personoj.
- La profito estu 25 % de la vendoprezo
- FEL zorgos por bona administrado
- FLEJA ne konkurencos al FEL sed rezervas al si la rajton vendi aliajn aferojn (ekz. ŝvitĉemizojn k.s.)
- FLEJA respondecos pri la prunteprenitaj libroj.

La kompleta teksto estos tajpita kaj disponigita al la estraranoj de FEL. Definitiva decido okazos en la venonta estrarkunsido de FEL.

2.2. FLEJA-informkampanjo.

Temas pri diversaj broŝuroj kaj faldfolioj. Fakte, tio rilatas al LA VERDA STELO kiu ja eldonas specialan numeron de ESPERANTO PANORAMA, ĉar jam FEL ne akceptis subvenciadon. LVS kunvenos je 21 05. KT volas eldoni, ne nur specialan numeron de ESPERANTO PANORAMA, sed ankaŭ aliajn faldfoliojn.

2.3. Membroadministrado.

Ĉu FEL, en la nova adminstrasistemo, daŭre akceptas prizorgi ankaŭ la membroadministradon de FLEJA ?
Jes, kiel en la pasinteco.
ID opinias, ke ni devas strebi al kiel eble plej kompleta integriĝo inter FEL kaj FLEJA.

2.4. FLEJA-semajnfino.

KT jam invitas FEL-estraron kiel kutime partopreni la Junularan Semajnfinon okazigante tie estrarkunsidon.
La semajnfino okazos je 2-3-4-a de novembro 1984 en DE PINTE.

3. Sekretariaj aferoj.

3.1. ID ricevis leteron de la Urba Kulturservo de Antverpeno - 6-a Distrikto rilate al kunmeto de nia organizo kadre de la urba kultur-konsilaro.
Ŝajne la servo intermiksas la landan ligon (FEL) kun la loka grupo (LA VERDA STELO)
JB kontaktos la koncernan servon por enordigi tion.

3.2. Membrovarbado.

PP eltrovis ke diversaj membroj de UEA ne (ankoraŭ) estas membroj de FEL. Ĉu alskribi ilin por klopodi aligi ilin ?
Jes. JB verkos leter-projekton amendumotan de la aliaj estraranoj.

3.3. Rilate al la repag-rememoroj, ID opinias ke pli bone estus ne plu memorigi la aferon al la grupaj kasistoj, ĉar ja tio ŝajnas perdita peno, sed rekte al la koncernuloj mem.

4. "Test 5000" - kampanjo

La Germana Esperanto-Junularo, post du artikoloj en la gazetaro pri kurseblecoj pere de ESPERANTO PROGRAMITA, ricevis pli ol 900 respondojn.
Ĉu ni ne imitus ilin ?

# flandra esperanto-ligo

# vlaamse esperantobond

# ORGANIGRAMO

Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Ø (03) 234.34.00

Kantooruren
Oficaj horoj
9.00-12.30 - 13.15-17 h.

Postrekening
Ĉirkonto
000-0265338-43

Bankrekening
Bankkonto
402-5510531-55

BTW
AVI
419.028.122

# HONORA KOMITATO

| | | |
|---|---|---|
| Emiel CORTVRIENDT | Diepestraat 29,<br>2000 ANTWERPEN | 03/232 44 30 |
| Frans COUWENBERG | Koninginnelaan 14<br>8370 BLANKENBERGE | 050/41 25 75 |
| Gerard DEBROUWERE | Magdalenastraat 29<br>8500 KORTRIJK | 056/22 16 54 |
| Fernand ROOSE | St. Klaradreef 59<br>8000 BRUGGE | 050/33 19 81 |
| Cesar VANBIERVLIET | Oudenaardsesteenweg 158<br>8500 KORTRIJK | 056/22 00 11 |
| Jules VERSTRAETEN | St. Bernardsesteenweg 1078<br>2710 HOBOKEN | 03/27 66 43 |

# ESTRARO

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto | Ivo DURWAEL<br>Paul Gilsonlaan 5<br>2520 EDEGEM | 03/440 30 92 |
| Sekretario : | Jan BOVENDEERD<br>Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 06 |
| Financoj | Erik D'HONDT<br>Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM | 053/77 44 97 |
| | Paul PEERAERTS<br>Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| Informado | Edward SYMOENS<br>Putsesteenweg, 131 A<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 62 66 |



| | | |
|---|---|---|
| Intergrupa agado | Hilde VAN INGELGEM-VANDRIESSCHE<br>Arbeidstraat 21<br>9300 AALST | 053/70 50 11 |
| | Trees DOOMS<br>Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |

## Komisiitoj:

| | | |
|---|---|---|
| Kadrokursoj | André STAES<br>Jan Denucéstraat 1/198<br>2020 ANTWERPEN | |
| Gazetara Servo | Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT<br>Lusthuizenlaan 1 b.4<br>1500 HALLE | 02/360 17 22 |
| Literaturo/Eldonoj | Christian DECLERCK<br>Amerikalei 135/2<br>2000 ANTWERPEN | |
| Sciencoj | Wim DE SMET<br>Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 99 49 |
| Kibernetiko | Willy HUYBRECHTS<br>Rozendreef 33<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 99 88 |
| Provincaj respondeculoj | Brabanto : M. Th HENQUINEZ<br>Lipsestraat 166<br>2991 TILDONK | 016/23 61 90 |
| | Limburgo : Guido SCHROEYERS<br>Helzoldstraat 113<br>3558 HELCHTEREN | 011/53 64 10 |
| | Okc. Flandrujo : vakas | |

# ADMINISTRANTARO REPREZENTANTARO

Klarigo de mallongigoj : Ko : Korespondadreso
P : Prezidanto
S : Sekretario
Ka : Kasisto
A : Administranto(j)
R : Reprezentanto

## Antverpeno

| | | | |
|---|---|---|---|
| LA VERDA STELO | Ko - | Frankrijklei 140<br>2000 ANTWERPEN | 03/234 34 00 |
| | P | Ivo DURWAEL<br>P. Gilsonlaan 5<br>2520 EDEGEM | 03/40 30 92 |
| | S | Paul PEERAERTS<br>Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| | Ka | Henri BOLJAU<br>Pastorijstraat 45<br>2000 ANWTERPEN | 03/35 95 45 |
| | | Konto : 000-0072654-01 | |
| | A | Ivo DURWAEL | |
| | | Rosette VAN HERCK<br>Van Raemdoncklaan 88<br>2520 EDEGEM | 03/457 14 40 |
| | | Cecile LEUNTJES<br>Eksterlaar 74<br>2100 DEURNE | 03/321 28 53 |
| LA ERIKEJO | Ko | Rozendreef 33<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 99 88 |
| | P | Edward SYMOENS<br>Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 62 66 |
| | S | Pansy HUYBRECHTS<br>Rozendreef 33<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 99 88 |



| | | | |
|---|---|---|---|
| | Ka | Willy HUYBRECHTS<br>Rozendreef 33<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 99 88 |
| | A | Edward SYMOENS | |
| ESPERANTO MECHELEN | Ko | Lange Zandstraat 52<br>2580 St. Katelijne Waver | 015/31 17 90 |
| | P | Roger SAELS<br>Lange Zandstraat 52<br>2580 St. Katelijne Waver | 015/31 17 90 |
| | S | idem | |
| | Ka | idem | |
| | A | idem | |
| ESPERANTO MORTSEL | Ko | Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 06 |
| | P | Paula TYTGAT<br>St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 24 |
| | Ka | idem | |
| | S | Jan BOVENDEERD<br>Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 06 |
| | A | Kristin TYTGAT<br>St Hathebrandstraat<br>2510 MORSTEL | 03/449 50 24 |
| SCHOTEN | R | Edward SPITAELS<br>Tijllaan 11<br>2120 SCHOTEN | 03/658 74 20 |
| Turnhout | R | Gorik DUYCK | |
| WILRIJK | Ko | Doornstraat 22<br>2610 WILRIJK | 03/827 24 05 |
| | P | Monique VEREECKEN | |
| | S | Patrick DE SCHEPPER | |
| | Ka + A | Linda DE SCHEPPER<br>Ĉiuj sama adreso | |

# Brabanto

| | | | |
|---|---|---|---|
| ESPERANTO BRUSELO | P | Emiel VAN DAMME<br>Albert I straat 44<br>1750 SCHEPDAAL | 02/569 17 83 |
| | S | S-ino BOUVY<br>Steenboklaan 129<br>1200 BRUSSEL | 02/771 27 32 |
| | Ka | Roger Brabant<br>Hansen-Soulie 75B6<br>1040 Brussel<br>Kontoj : 961-0907453-13<br>000-0123048-52 | |
| | A | Emiel VAN DAMME<br>Albert I straat 44<br>1750 SCHEPDAAL | 02/569 17 83 |
| ESPERANTO 2000 | Ko | Duisburgsestraat 12<br>3030 LEUVEN-HEVERLEE | 016/20 14 53 |
| | P | Jean Pierre FERTINEL<br>Diestersteenweg 18<br>3970 LEOPOLDSBURG | |
| | S | Marc VAN DEN BEMPT<br>Duisburgsestraat 12<br>3030 LEUVEN-HEVERLEE | 016/20 14 53 |
| | Ka | Herman VAN EYNDT<br>Hofeinde 43<br>2280 GROBBENDONK<br>Konto : 734-3331944-03 | |
| | A | M. Th. HENQUINEZ<br>Lipsestraat 166<br>2991 TILDONK | |
| SCHEPDAAL | R | Emiel VAN DAMME<br>Albert I straat 44<br>1750 SCHEPDAAL | 02/569 17 83 |



# Limburgo

| | | | |
|---|---|---|---|
| ESPERANTO BERINGEN | Ko | Paalsesteenweg 10<br>3950 BERINGEN | |
| | P | Jos LEMMENS<br>Maasheide 7<br>3950 BERINGEN | 011/42 26 36 |
| | S | Alfons BECKERS<br>Paalsesteenweg 10<br>3950 BERINGEN | 011/43 66 22 |
| | Ka | Alfons Beckers | |
| ESPERANTO HASSELT | Ko | Zonnebloemstraat 7<br>3610 DIEPENBEEK | 011/33 66 03 |
| | P | Marcel AERTS<br>Lazarijstraat 122<br>3500 HASSELT | 011/25 34 67 |
| | S | Albert CLAESEN<br>Zonnebloemstraat 7<br>3610 DIEPENBEEK | 011/33 66 03 |
| | Ka | idem | |
| | A | idem | |
| HELCHTEREN | R | Guido SCHROEYERS<br>Helzoldstraat 113<br>3558 HELCHTEREN | 011/53 64 10 |

# Okcident-Flandrujo

| | | | |
|---|---|---|---|
| AVELGEM | R | Julien ALGOET<br>Leynseelstraat 43<br>8580 AVELGEM | |
| BLANKENBERGE | Ko | Helmweg 7<br>8300 KNOKKE/HEIST I | |
| | P | Frans COUWENBERG<br>Koninginnelaan 14<br>8370 BLANKENBERGE | 050/41 25 75 |
| | S + Ka + A | Albert MARMENOUT<br>Helmweg 7<br>8300 KNOKKE/HEIST<br>Konto : 000-0436398-92 | 050/60 55 35 |

BRUGGE

| | | | |
|---|---|---|---|
| PACO KAJ JUSTECO | Ko | St. Klaradreef 59<br>8000 BRUGGE | |
| | P | Fernand ROOSE<br>St. Klaradreef 59<br>8000 BRUGGE | 050/33 19 81 |
| | S | Georgette WYBOUW<br>Eernegemstraat 56<br>8260 AARTRIJKE | 050/20 01 13 |
| | Ka | Marie Louise SENAVE<br>Altebijstraat 84<br>8310 BRUGGE St Kruis<br>Konto : 280-0206885-21 | 050/35 33 50 |
| | A | André D'HULSTER<br>Paul Michielslaan 10<br>8400 OOSTENDE | 059/80 06 95 |
| Bruĝa Reĝa Societo | Ko | Visspaanstraat 97<br>8000 BRUGGE | |
| | P | Roland ROTSAERT<br>Visspaanstraat 97<br>8000 BRUGGE | 050/33 00 04 |
| | S | Jean Pierre VANDENDAELE<br>V. de Saedeleerpad 3<br>8380 LISSEWEGE | 050/54 62 49 |
| | Ka | Y. CHRISTIAENS-POUPEYE<br>Gouden Boomstraat 68<br>8000 BRUGGE | |
| | A | Roland Rotsaert | |



| | | | |
|---|---|---|---|
| LA KONKORDO | Ko | Oudenaardsesteenweg 158<br>8500 KORTRIJK | |
| | P | Gerard DEBROUWERE<br>Magdalenastraat 29<br>8500 KORTRIJK | 056/22 16 54 |
| | S | Jan HANSSENS<br>Meiweg 23<br>8500 KORTRIJK | 056/21 31 06 |
| | Ka | Cesar VANBIERVLIET<br>Oudenaardsesteenweg 158<br>8500 KORTRIJK<br>Konto : 000-1144142-27 | 056/22 00 11 |
| | A | Cesar VANBIERVLIET | |
| RUMBEKE | R | Paul VERHALLE<br>Meensesteenweg 409<br>8810 RUMBEKE | 051/20 43 52 |
| WOUMEN | R | André GYSEL<br>Woumenweg 162<br>8178 WOUMEN | 051/50 13 95 |

## Orient-Flandrujo

| | | | |
|---|---|---|---|
| ESPERANTO AALST | Ko | Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM-AALST | |
| | P | Petro DE SMEDT<br>Hemelstraat 44<br>9330 DENDERMONDE | 052/21 26 77 |
| | S | Erik D'HONDT<br>Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM | 053/77 44 97 |
| | Ka | Clement AMANT<br>Brakelstraat 52<br>9300 AALST<br>Konto : 068-0679940-94 | 053/21 31 56 |
| | A | Erik D'HONDT | |

| | | | |
|---|---|---|---|
| GENTO - LA PROGRESO | Ko | Peter Benoitlaan 117<br>9229 GENTBRUGGE | |
| | P | Katja LÖDÖR<br>sama adreso | |
| | S | Monique CAESSTECKER<br>Kerkstraat 66<br>9940 SLEIDINGE | |
| | Ka | René BUDTS<br>Fr. Rooseveltlaan 205<br>9000 GENT | |
| | A | Arpad LÖDÖR<br>Brusselsesteenweg 443<br>9219 GENTBRUGGE | 091/30 13 01 |
| HERZELE | R | Robert DAEM<br>Kruisveldstraat 9/2<br>9550 HERZELE | 053/62 64 96 |
| NINOVE | R | Raimond STEENHOUDT<br>Pamelstraat 296<br>9400 NINOVE | 054/33 59 71 |
| OUDENAARDE | R | Stephaan d'HAEYER<br>Deinzestraat 154<br>9700 OUDENAARDE | 055/31 77 21 |
| St. NIKLAAS | Ko | Molendreef 81<br>9180 BELSELE | 03/772 57 42 |
| | P | Leo CORIJNEN<br>Weynstraat 1<br>2700 St NIKLAAS | 03/776 30 10 |
| | S | Gerard BAEYENS<br>Molen dreef 81<br>9180 BELSELE | 03/772 57 42 |
| | Ka | Frans orens<br>Beukenlaan 34<br>9190 SINAAI | |
| | A | Leo CORIJNEN<br>Weynstraat 1<br>2700 ST NIKLAAS | 03/776 30 10 |

# flandra esperanta junulara asocio

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto | Wim TYTGAT<br>St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 24 |
| Kasisto | Ite TYGAT<br>Terbiststraat 12<br>2018 ANTWERPEN | |
| Sekretario | Annemie SUYKENS<br>Maarschalk Gerardstraat 17<br>2000 ANWTERPEN | |
| Kongresoj | Ilse JACQUES<br>Molenstraat 29<br>2000 ANTWERPEN | |
| Kontaktoj kun GCA | Jean Pierre VANDENDAELE<br>V. de Saedeleerpad 3<br>8380 LISSEWEGE | 050/54 62 49 |
| Eksteraj rilatoj | Kristin TYTGAT<br>St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 24 |
| Kunlaboranto | Jan ERREYGERS<br>Weldadigheidsstraat 26<br>3000 LEUVEN | |
| J E N | André RUYSSCHAERT<br>Ganzestraat 66<br>8000 BRUGGE | |
| Koncize | Wim TYTGAT | |

## KOOPTITAJ ADMINISTRANTOJ

| | |
|---|---|
| Jan BOVENDEERD | Speeltuinlaan 14, 2510 MORTSEL |
| Guido CLAESEN | Steenakkerstraat 30, 3610 DIEPENBEEK |
| Dirk DEWEERD | Amerikalei 45, 2000 ANTWERPEN |
| Trees DOOMS | Baron Dhanislaan 13, 2000 ANTWERPEN |
| Jan HANSSENS | Meiweg 23, 8500 KORTRIJK |
| Marc VAN DEN BEMPT | Duisburgsestraat 12, 3030 LEUVEN |
| Hilde VAN INGELGEM | Arbeidstraat 21, 9300 AALST |

## ALIĜINTAJ KAJ/AU KUNLABORANTAJ ASOCIOJ

FABE (Flandra Asocio de Blindaj Esperantistoj)
p/a Emmanuel VANDEKERKHOVE
Pakenstraat 57
3030 LEUVEN-HEVERLEE 016/23 18 50 (de 19 ĝis 21 h.)

BEFA ( Belga Esperantista Fervojista Asocio)
p/a Lucien DE SUTTER
Pijnbomenweg 4
1180 BRUSSEL 02/358 15 73

IKUE/BLKE (Belga Ligo de Katolikaj Esperantistoj)
p/a Hubert AUDENAERT
Beekstraat 6
9100 LOKEREN 091/48 44 56

ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)
p/a Marc DEMONTY
Missionarissenlaan 39/5
1080 BRUSSEL 02/520 19 44

LABORISTA ESPERANTO-GRUPO "ANTAŬEN
Ruggeveldlaan 635 b.2
2100 DEURNE



Jes, komprenebIe.
JB petos al Herman kaj Annie Deceuninck-Bollaert prizorgi tian gazetaran kampanjon, transdonante la "Specialan Cirkuleron" en kiu GEJ raportas pri la kampanjo.
Praktike, respondi al simplaj petoj pri la kurso faros Esperanto-Centro, sendante la unuan kurson.
Specialajn demandojn pritraktos JB.
Al Herman kaj Annie JB petos publikigi la artikolon, ne nur en la ĉefaj gazetoj, sed ankaŭ en fak- kaj ĉefe junulargazetoj.

4. FINANCOJ

Pro la malĉeesto de estrarano pri financoj, ne eblas pritrakti tiun ĉi punkton.
Tamen ID aludas al la

Kontrakto FEL: Institucio Hodler 68.

Tiu ĉi kontrakto estos re-oridiskutata okaze de la morgaŭa (840506) kunsido de la administrantaro de Inst. Hodler.
ID kaj JV ĉeestos.

5. INTERGURPA AGADO

ID ricevis leteron de la Genta "LA PROGRESO" en kiu ili anoncas la ricevon de alvoko de la Kanada Ambasado rilate al "Festo de la Amikeco Belga-Kanada" okazonta en Gento. Ili petas kunlaboron.

Okazos diversaj prelegoj, ĉu nacilingvaj, ĉu kun traduko.

LA PROGRESO serĉas kompetentulon por kunlabori en tio.
Kiu ?
Ni serĉos.

6. Diversajoj

6.1. Bulgara Esperanto-Asocio petas por Internacia Ekspozicio pri libroj pruntesendon de niaj eldonaĵoj.
PP prizorgos la alsendon.

6.2. INFORMILO.

ID atentigas pri la sufiĉe altaj kostoj de INFORMILO, cele al ebla ŝparo.
Kvankam INFORMILO fakte estas - kiel esprimas sia titolo - informfonto por la kadromembroj kaj ceteraj interesitoj, li tamen vidas tri diversajn informŝtupojn :

1. Kompletan kaj detalan raporton bezonas la estraranoj.

2. La grupaj respondeculoj ne nepre bezonas detalan raporton pri la diskutado, sed jes la plej esencajn partojn el la protokoloj.
Rilate al tio, li proponas kunmeti tekston pri tiuj esencaj partoj unu fojon kvartale (do, 4 X jare).

3. Tio, kion ĉiu membro devas scii, povas esti publikigita en ESPERANTO PANORAMA.

JB, kiu per tio havos iom pli da laboro, konsentas kaj proponas :

1. Verki detalan raporton nur por la estraranoj
2. Decidi en la kunsidoj pri kio devos esti informitaj la grupaj respondeculoj .
3. El tio, verki 3-monatan INFORMILO-n.

Aprobite principe, sed fareble nur ekde 1985 ĉar la abonoj por 1984 jam estas pagitaj.

6.3. ES telefone raportis al JB pri sia partopreno en Internacia Seminario en Varsovio.
Li faros raporton pri tio, sed jam komunikas, ke laŭ lia sperto, la Esperanto-Movado disdividiĝas en du partoj : la "internuloj" (homoj - inter kiuj eĉ eminentaj esperantistoj) kiuj volas organizi sin en aparta "Esperantujo" kaj "eksteruloj" = personoj kiuj volas disvastigi Esperanton kiel eble plej ĝenerale.

Pri la kolokvo en Aalst, ES volas konsideri tiun kiel preparon, elanon al venonta internacia simpozio direktita al la praktiko.

Fine, ES anoncas, ke pro familiaj kialoj, li ne ĉiam estas certa ĉu li povas partopreni la estrarkunsidojn. Tial li de antaŭe petas senkulpigon.

Fino de la kunsido : 17.00 h.

JB.

------------------------



K R I Z O

Jes, kial ne iom umadi pri krizo ? Tiel ni restas aktualaj.

Certaj diras ke ekonomia krizo pliviglígas la kulturan vivon. Tekstilindustriistoj eĉ asertas ke, en krizaj cirkonstancoj, la homoj sin pli bele vestas.

Kiel la krizo efikas sur la Esperantomovado ?

Ĉu mi pravas dirante ke jes la interesiĝo de la publiko pligrandiĝas, ke jes la Esperanto-kursoj, kaj precipe la rapidkursoj, havas pli kaj pli da sukceso, ke jes la abonantaro al niaj revuoj daŭre kreskos, sed tamen nia membraro malpliiĝas ? Ĉu konkludi el tio ke la homoj jes aktiviĝas, sed elspezas sian monon pli racie, eĉ se temas pri nur malgrandaj sumoj ? Aŭ ke la aktivuloj ne malpli aktivas, sed ke ilia agado estas ligita al iliaj materiaj eblecoj ? Kompreneble, se bona agado implicas kunsidojn, vojaĝojn kaj aliajn monkostajn aranĝojn, kiel ekz. leterinterŝanĝadon, malpliigo de elspezado aŭtomate sekvigos redukton de tiuj aktivecoj aŭ almenaŭ pliraciigon proporcie al la disponeblaj rimedoj.
Ĉu tio povus esti kaŭzo ke en certaj situacioj ni devas konstati ke personoj, de kiuj oni normale povus atendi senrezervan aktivecon, donas la impreson de malaktiveco ? Ekzemple, pli kaj pli ofte, ni aŭdas ke movadaj respondeculoj, kiuj finfine devas decidi pri jes aŭ ne komencitaj kaj/aŭ aprobitaj agadoj, eĉ ne respondas al leteroj al ili senditaj ? Ĉu vere pro krizo ? Aŭ ĉu ni (kaj "ni" ĉi tie signifas la tutan movadon) mem kreis movadan krizon, eble pro aŭ sekve de la ekonomia krizo ?
Fenomeno konstatebla estas ke, prepare al la jubilea jaro, UEA ellaboris tre detalan programon. Ni scias ke diversaj organizoj kaj landaj asocioj entuziasme reagis, sed ĉu vere ĝi estas realigota ?

Aliaj ideoj naskiĝis kaj materialiĝis en novajn iniciatojn, inter kiuj tre elstaraj kaj internacie aplik-ebl/-endaj. Ili stagnas, ĉar kvankam konsiderataj valoraj kaj necesaj, ilia realigo estas kondiĉita per la disponeblaj fortoj.

Krizo, do.

Tamen, ĉi tia krizo ne estas nura sekvo de la ekonomia krizo, eĉ se eble pliakrigita.

En nia movado - kaj certe ne nur en NIA movado - tre ofte, por ne diri ĉiam, la iniciatinto de 'io' estu samtempe ĝia realigonto. Tro bone konata estas la 'fenomeno' ke, kiam 'iu' proponas ion en kunsido, li sen tro da problemoj akiras la aprobon de la respondeculoj kaj por ĝia realigo ankaŭ helpon samproporcian, sed inverse.

Okazas ke proponinto de ideo tamen renkontas favoran reagon kaj eĉ helpopretecon de iu alia. Tiu alia tamen, en sia kampo, spertos la samajn malhelpojn, tiel ke finfine la vera rezultato ne estos pli ol ĉeno de seniluziiĝoj.

**Proponoj estas multaj. Promesoj ankaŭ. Nur firmaj faroj mankas.**

Ĉu tio estas metebl-/-enda sur la nuran konton de la ekonomia krizo ? Aŭ ĉu ni en Esperantujo imitas la ĝeneralan scienc-politikon aŭ politik-sciencon laŭ kiu ĉiu interesiĝu nur pri siaj personaj sukcesoj, volas pruvi nur siajn personajn ideojn senkonsidere al la aliaj ? Se tiel, ni troviĝas sur bedaŭrinda, eĉ danĝera tereno kondukanta, se ne al malica manovrado, al ĝenerala seniluziiĝo, al neevitebla stagnado.

Tio cetere eksplikas la hodiaŭan situacion en kiu, laŭ mia persona ideo, la mavoda krizo estas pliĝustadire sekvo de sinsekvaj seniluziiĝoj de aktivaj personoj, kiuj vane atendas efektivigon de promesitaj aŭ necesaj helpagadoj kaj finfine limigas sian propran aktivecon al siaj realaj atendebloj...

El tio aŭtomate sekvas malpliigo de aktiveco kaj finfine forlaso de la ideo, forlaso de la aktiva movado !

Ĉu tia devus esti nia estonto ? Ĉu tia p o v u s esti nia estonto ?

Al ni la respondo !

Aŭ ni ĉiuj kune laboru en komuna agadplano, aŭ ni akceptu la respondecon pri nia malsukceso vid'al vide la ceteran mondon, vid'al vide la venontajn generaciojn; ni akceptu la respondecon pri ebla pereo, de ni mem kaŭzita, de tio, kion per tiom da penoj kaj tiom da kuraĝo efektivigis L.L. Zamenhof kaj liaj posteuloj.

Permesu ripeti ĉi tie plian fojon :

> Socio bone evoluas nur se ĝiaj membroj estas pretaj fari tion, kio devas esti farata.

Josuperter.

---